

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

Enhavo:

- ✓ Georgi Sapunĝiev: Mia unua fabelo.
- ✓ Miti: Dediĉo.
Petro Dinekov: Amo.
Asen Grigorov: Rezigno.
- ✓ Miti: Panteismo.
- ✓ Georgo Aktarĝiev: Cigana muziko.
- ✓ Stela Morbilli: Triobla fragmento.
Zahari Zahariev: Skizoj.
- ✓ Slavka Stiplieva: La iracionalismo en la bulgara popolkanto.
- ✓ Ada: Inter ni.
Enlanda Esperanto-movado; Recenzoj k. a.



Recenzoj

Kataluna Antologio, kompilita de Jaume Grau Casas, Barcelona, 1925, formato 15×22 cm., paĝoj 416, prezo (afrankite): 2 dolaroj, 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 15 pesetoj. Mendebila ĉe: s-ro Eduard Capdevila, str. Carders, 29, Barcelona.

La apero de la Kataluna Antologio estas grava fakto en nia esp. literaturo. Ĝi estas silenta, sed forta vangofrapo al la malsane eldonemaj aŭtoroj, kiuj per sensignifaj libretoj kaj libretaĵoj malbonuzas la esperantemon de niaj literaturamantoj. Kiel esperant-lingva eldonaĵo ĝi konvinkas indiferentulojn, ĝi konvertas senrezerve al Esperanto eĉ niajn kontraŭulojn. Ĝi estas perfekta antologio-modelo. Multon povas lerni el ĝi niaj antologi-kompilantoj. Post la tralego de la Kataluna Antologio la leganto restas plene kontenta. La kataluna popolo aperas tutece antaŭ la okuloj; lingvo, vivo, kantoj, moroj, poezio, prozo, dramo — ĉio estas reprezentita en la antologio. Kvazaŭ en sonĝo trapasas la spirita vivo de Katalunio — jen trobadoroj kantas, jen modernaj verkistoj estras la nuancojn de la vivo.

En malgranda recenzo oni ne povas prezenti la grandan enhavon de la antologio. Oni devas posedi kaj legi ĝin.

La kompilinto meritas varman manpremon. Nur granda amo al lia popolo kaj al la esperanta literaturo povus instigi lin al tia kolosa laboro, kaj nur granda amo povas produkti tian majstran verkon.

Viktimoj, romano el la vivo de siberiaj militkaptitoj de Julio Baghy, Budapest, 1925, eldono de la Hungara Esperanto-Instituto, formato 12×16 cm., paĝoj 164, prezo 25,000 hung. kronoj.

Tempo — la revoluciaj tagoj en Rusio.

Loko — vasta Siberio.

Ĉefpersono — Johano Bardy — aktoro.

En bela kaj atentinda lingvo nia konata esperanta poeto Julio Baghy kortuŝe rakontas la tragedion de la homa animo. En la ĉefpersono de la romano oni povas facile ekkoni la aŭtoron mem. Jen kial ĉio en la romano estas priskribita nature kaj sincere. Legante la romanon oni sentas la malvarman spiroblovon de Siberio, la grandan figuron de la revolucio, tra kies pulvnebullo trenas sian vivon la homoj — viktimoj.

La romano estas valora pliriĉigaĵo de nia originala esp. literaturo.

Legolibreto de J. Borel, N-o 1 de Esperanta Biblioteko Internacia. Eldonas Ellersiek & Borel, G. m. b. H. Berlin — Dresden, kvara eldono (22-a—33-a miloj), paĝoj 48, prezo 0.40 R.-markoj, formato malgranda.

Tre taŭga legolibreto por kursoj.

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO :
por Bulgario
40 levoj,
por alilando
2.50 sv. fr.
aŭ egalvaloro

MONATA ORGANO
DE LA BULGARA ESPERANTISTA
SOCIETO

Adreso
de la Redakcio
kaj administracio :
Sofia (Bulgario),
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lerneĵ-bibliotekoj
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

Mia unua fabelo

En nia vilaĝo vivis iam malgranda knabino surdemuta. Neniu ŝin amis, neniu ŝin estis karesinta. Geknaboj ŝin pelis ĵetante post ŝi ŝtonojn, kaj ofte ŝiaj piedoj estis vundataj. Neniu sciis, el kie ŝi venis, kaj kie ŝi dormas. Neeble ja estas kompreniĝi kun surdemuta.

Ĉiuj nomis ŝin: la senhejma surdmutulino. Ŝi vagis tra vinberejoj, legomĝardenoj, grenkampoj kaj nutris sin kiel sovaĝa besto. Ŝiaj vangoj estis palaj, iom ruĝetaj kaj kvazaŭ diafanaj, pro neregula nutrado aŭ malsano. Ŝia rigardo estis profunda, subtila kaj milda. Mi ne povis klarigi al mi, kial oni malamas ŝin tiel senkompate. Kaj mi pensis: kiam mi fariĝos plenaĝa kaj mi fariĝos vilaĝestro, mi protektos ŝin, neniu povos ŝin moki, ofendi aŭ peli... Mi faros al ŝi malgrandan domon, kaj ŝi vivu tie memstare...

Tiel mi pensis, kaj la amo je ŝi en mia koro pli kaj pli kreskis.

En la lerneja korto dumvintre ni faris neĝbulojn etajn, kiujn ni rulis en la neĝita korto, — de tio la neĝbuloj pli kaj pli grandiĝadis... tiel ankaŭ mia amo al ŝi ĉiutage pligrandiĝis...

Dumsomere ni, la lernantoj, pogrupo invadis la vinberejojn vilaĝajn kaj ŝtele kolektis ĉerizojn, prunojn, pirojn. Kiel bele estis — manĝi la malpermesatan frukton! Vi scias, ke se la gardisto kaptus vin, li perbastone amindumus kun vi, sed malgraŭ tio vi riskas grimpante de branĉo al branĉo, manĝante la dolĉajn ĉerizojn! Venas la gardisto surprize, kaj ni ĉiuj kapturte forflugas. Se li kaptos iun el niaj ŝteletuloj, li estos batata por ĉiuj... Ja ankaŭ tiam ni konsideris la principon — unu por ĉiuj, kaj ĉiuj por unu... Okazis ofte, ke mi estis tiu viktimo... tamen sekvantfoje la ĉerizoj estis duoble pli dolĉaj...

Foje miaj samaĝuloj malkovris forlasitan vinberejon kaj ĝoje sciigis al mi, ke ni povos tie senriske tagumi tutajn tagojn. Kelkiu el ni ŝirkolektis kampoflorojn, kaj faris belajn bukedojn, kelkiu ekrapis la ĉerizajn branĉojn, ĵetante unu al alia parojn da ĉerizoj. Preter la vinberejo pasis la surdmuta senhejmulino. La knaboj freneze ekkuris post ŝi, kaj la teraj buloj ekfalis furie ĉirkaŭ ŝi. Laŭtvoĉe mi kriis al miaj kunuloj, defendis ŝin kaj malpermesis al ili ofendi ŝin.

Verŝajne mia voĉo kaj paroloj estis potencaj ĉar ĉiuj, almenaŭ tiun fojon, aŭskultis min obeeme. Iu estis ŝin frapinta je la kalkano kaj ŝi ploris, poste kurbiĝis kaj bandaĝis ĝin veante.

Ĉiuj disiris. Restis nur ni, kvin, ses buboj, kiuj estis paŝtontaj la ĉevalojn dum tiu nokto. Mi eksentis min eksterlime forta, fiera kaj feliĉa . . . Mi ĝojis kaj mia animo kantis pro ĝojo. Mi naĝis en beleco kaj trankvilo. Ŝi pasis survoje malrapide kaj mi rigarde sekvis ŝin — kiel ŝia kufo blanketas kaj perdiĝas for de miaj okuloj . . .

Okazis tiel, ke dum tuta semajno mi ne revenis vilaĝen. En la arbaro, en la falĉejo sub pura kaj hela ĉielo mi dormis. En la aero portiĝisodoro de fojno, kaj de tie mi rigardis, rigardis la stelojn, la lunon, la ĉielon, la nubojn. Mia animo flugis, mi revis al io nekonata, bela, alloga . . . La ĉevaloj paŝtis sin, kaj mi longe rigardis la Galaksion.

La Galaksio — kiom da dolĉaj fabeloj mi aŭdis pri ĝi dum tiuj blankaj someraj noktoj!

Dum simila blanka somera nokto, kiam la kampo odoras je eriko, galio kaj ankaŭ je multaj aliaj sennomaj herboj aromaj, trovis min la senhejma surdemuta . . .

Mi estis kuŝanta, rigardante la galaksion kaj aŭskultante la monotonan kanton de la griloj.

La nokto spiris trankvilecon, ĝojon kaj la animo volis forlasi sian kruston — la korpon. Ŝi venis al mi. Ŝi estis longe min serĉinta kaj fine, vidinte min, ĝoje ekkriis, tutbruste freneze ekkriis: haaa . . . hoo! . . . tiel ŝi esprimis sian tutan ĝojon, feliĉon . . . kaj la eĥo respondis, la serena ĉielo respondis: ĥa ĥa . . . ĥooo . . . De malproksime ekkriis miaj samaĝuloj vagantaj kun ĉevaloj tra la paŝtejoj. Mi konsternite rigardis ŝin, mirante kiel ekparoli al ŝi. Ŝi prenis mian manon, iom skuis ĝin, tenis ĝin longe kaj poste ĝin metis sur sian ŝultron. Ŝiaj vestaĵoj estis malsekaj, de ŝiaj manikoj gutis akveroj . . .

— Kio do okazis? Kial vi estas malseka? Hodiaŭ ja ne pluvis — ekparolis mi konfuzite.

Ŝi rigardis min, kaj ŝiaj ŝultroj tremis.

— Nu, mi miris, kiel mi komprenu vin?

Ŝi sidiĝis, ŝiaj okuloj estis larmoplenaj kaj ŝiaj lipoj ion nekompreneblan parolis. Mimike ni komencis nin komprenumi. Fine mi komprenis, ke fraŭlo ĉerpranta akvon el puto disverŝis super ŝin sitelon da akvo . . . Ŝi ploris kaj ĉiel, tutforte volis diri al mi, ke aliajn vestojn ŝi ne havas. Ie malproksime paŝtisto reve

ŝalmis malgajan kanton, kaj iu interna voĉo flustris al mi: faru la bonon... Mi donis mian veŝton, mian burkon al ŝi, flankiĝante inter la fojnamasoj.

— Hoo! poste mi aŭdis ŝian voĉon. Mi eliris kaj sidiĝis apud ŝi. Mi ankoraŭ memoras kiel ĝoja, kiel kontenta ŝi estis tiam.

— Dum meznokto estas gnomoj, mi diras al ŝi, ni faru fajron, kaj la gnomoj de l'fajro forkuros. — —

Ni faris grandan fajron, altaj flamoj gravuriĝis alten, alten, kaj ĉirkaŭ ni estiĝis tute hele. — Ŝi sidiĝis apud la fajro, sekigis siajn vestojn kaj alparolis al mi strangajn vortojn. Mi metis mian kapon sur ŝiajn genuojn kaj rakontis al ŝi lerneajn fabelojn. Ŝi klinis sian kapon al mi, atente aŭskultis kaj kvazaŭ komprenis. —

Super ni estis blanka, hela ĉielo. La steloj vibris, kvazaŭ palpebrumis al ni ĝoje. Mi suprenrigardis, rigardis la Pleadajn, la Galaksion, montrante ĝin perfinge al mia senhejma amikino, rakontante al ŝi la prigalaksian fabelon.

„Tiu ĉi steloj estas fajreroj de l'korpo de unu anĝelo. Tiu anĝelo estis enamiĝinta je unu tera knabino. Ŝi estis bela. Ŝia vizaĝo estis blanka kiel ŝaŭmo, kaj la okuloj estis nigraj kiel ebono.

„Bone, tamen Dio ne konsentas ke la anĝeloj ekamu terajn knabinojn. Tio estas peko. Kaj li punis la enamiĝintan anĝelon ĵetinte lian korpon teren. La anĝela korpo dispeciĝis je multaj steloj — okuloj — por ke la tera knabino rigardu lin, aŭ la anĝelo rigardu ŝin per multaj okuloj — steloj.“

Ŝi eble nenion komprenis, eble ĉion — mi ne scias, sed ŝi perkape jesis, ridis kaj montris al mi la saman stelaron. Poste ni stariĝis, kruccignis kaj ni proksimiĝis apud la odora fojno, dissternis ĝin kaj kuŝiĝis kovriĝante ambaŭ sub mia burko. Ŝi spiris varme apud mi. Rapide mi ekdormis. Dumsonĝe mi eksentis kiel arde ŝi kisis min, kiel forte, pasie ĉirkaŭprenis min kaj mi timis, ke ŝi strangolos min. Pro timo mi vekigis. Tutforte mi forkuris — — Miaj vangoj ardis de l'unuaj amaj kisoj...

Tagiĝis...

Pasis longaj jaroj. Mi studis. Mi enkapigis multajn sciojn, lingvojn, filozofiojn. Mia scio neis ĉion. Nenion mi kredis. Nenion mi ŝatis. Neniun mi amis. Je ĉio mi malesperiĝis. Restis al mi nur la kuglo... Kaj mi devis elekti: aŭ sensignifan vivon, aŭ kuglon... Mi malsaniĝis. Oni konsilis min ke mi iru vilaĝen, por ĝui trankvilecon. Alveninte en la vilaĝo, mi evitis renkonton eblan kun ĉiuj. Mi serĉis solecon. Vespere mi ree vagis tra la kamparo, falĉejoj, grenkampoj kaj arbaro. Senespere mi serĉis ekvilibron kaj enviis al la paŝtistoj pro ilia naiva, ĝojoplena vivo. Mi vagis dum longaj blankaj noktoj someraj, rigardis la Galaksion kaj serĉis la perditan amon de mia infanaĝo, mi serĉis ies burkon sub kiu mi povus kaŝiĝi de miaj inkuboj. — — Tamen tiu ĉi burko malaperis kun la perdiĝo de mia senhejma surdmuta amikino.

ESPERANTA ANTOLOGIO

DEDIĈO

Alvenu, Tamara, kaj falu
sur la bruston brulantan en flamo!
Mian koron velkigas la amo
kiel suno floretan la palan!

— Mi estis infano malsaĝa,

kiu amis, kaj ĝojis, kaj ploris,
kaj ne sciis ke nur la doloro
estas vera surtera riĉaĵo

Mi: tiajn suferojn travivis!

kaj mi tiel deziris la pacon!
La fremdulo jam estis tro laca
por vagadi la vojon deklivan.

La nigra fantomo de l'tagoj

kaj de l'noktoj de l'galo-ebrioj

estis unu deziro pasia,

estis unu volupta imago.

Kaj poste... kaj poste la brulo.

kaj en koro freneza la ŝtormo,

kiam antaŭ ol lace ekdormi

tiel bruas la sangaj nebuloj!

La korpoj — la ŝtona idolo —

ĉiutage silentis, kio ofero,

ĉiutage silentis suferis

retrompitaj de l'tera konsolo.

Utinam! La kiso de l'lipoj

ĉu ne estas la vera feliĉo,

kiam korpo kaj korpo kuniĝas,

kiam ilin volupto ekvipas?

La tempo ekplaŭdas per manoj;

kaj la tagoj flugas senĉese.

Oh, ekhaltu! kompatu! karesu

ankaŭ viajn malriĉajn infanojn!

Estingu la fajron sovaĝan,

redonacu la dornojn survojajn —

ĉar mi scias ke nur la malĝojo

estas vera surtera riĉaĵo.

Varna

Miti

A M O

Mi en bruo perdis min.

Tra l'popolamaso sola

vagis, vagis mi sen fia

kaj la vivo brue bolis,

krude ĝi turmentis min.

En mallumo — jen lampir

brilis tra ŝtonoza vojo

kaj ekiris mi — martir

al sufero, al malĝojo,

de la lumo kavalir.

Mia koro jam heliĝis.

Ĉin ne movas plu dolor.

Kaj mi parolis: —

la konsola vorto

— „amo” —

difinita de la sorto

restli por lacega kor

amikin ĉiama.

Kiam batas mia koro en turment

Kaj doloras troe la anim —

tiam kaptas min karese nova sent

kaj silente ĝojas, ĝojas mi sen lim.

Petro Dinekov

REZIGNO

Ĉu varmigis nia frata amo?

Ĉu nin vekis nia flama vort?

— Estis vana nia granda flamo,

nia frata amo estis mort!

Ne tintigu nun la ferkatenojn,

ĉar nin aŭdos nia kara panj,

ĉar ŝi per malbenoj, per malbenoj

devas venĝi pro la karinfan.

Jen — malvarme falas la krepusko —

aŭdu! — estingiĝas ies viv.

Kiel ruze kaŭras la embusko

ĉe la plej proksima vojdeklin!

Jam rompiĝis nia tondra volo

kaj la koro estas nur ruin.

Tutsilente paŝas tra la solo

nia funebranta naskintin.

Asen Grigorov

Panteismo

Lumigate de l'blanka luno, la vento freneze flugas — denorde suden, desude norden, al oriento kaj al okcidento — super la kampoj kaj super la arbaro.

Kiel morne bruegas la arbaro! Mi aŭdas ĝian lupan muĝon. Ĉu ne lamentas ĝi sub la vipoj de la vento? Ĉu ne ridaĉas per la rikana rido de la lupoj? . . . La fenestroj kaj la pordoj grincas. Iu frapas per timiga persisto. Iu el la malluma loĝantaro de la nokto. Kaj la vipoj de la vento siblas sur la ŝultrojn de l'arbaro. Tria nokto.

En la aero estas odoro je io sovaĝa. Sovaja estas la vento. Sovaja estas la ploro de la arbaro. Sovaja sufero turmentas mian animon . . . Kaj pro kio — mi ne scias.

Estas bela la lupa nokto. Sed kial la memoro pri tiu mateno, la hieraŭa, tiel fiksis okulojn orajn al mi, ke mi ne povas ĝin forgesi? Mi estis en la arbaro — sola inter la amikoj kverkoj. Kaj mi parolis:

Ho suno — suno! — estu benata via varmo. Kiel delikata tremeto de kvietaj amo ĝi enpenetras la tutan estaĵon kaj fandas la animon. Ho suno — suno!

La mateno estas plena je bluetaj blanka lumoj kaj la foraj montoj vokas nekontraŭstareble al si. Mi rigardas trans la larĝe fermitan fenestron. Mia penso estas tamen for de la enuiga laboro — tien, kie en la sunnebulo levas sin la montoj sudoriente, kie trans la kampoj, kaj trans la altaĵoj, kaj trans la arbaroj sopiras la maro, ritme levante en deziro akvan bruston. Kaj mi eliras el la ĉambro kaj vagas tra la arbaro.

La mateno estas plena je tiom da volo por luma libero kaj tiom da senlima aspirado al la lumaj vastaĵoj . . . La animo senfortiĝas sub la varmegaj kisoj de l'suno kaj fandiĝas en la brilo, kiel en la pasio de unu granda amo. Ho suno — suno! — estu benita via varmo! Estu benita via granda amo!

Tion mi parolis en la arbaro. Nun estas nokto. La vento freneze flugas — desude norden, denorde suden, al oriento kaj al okcidento. La arbaro nun ĝemas.

Mi memoras la fruajn tagojn, kiam la maro estis tiel proksima — kaj mi estis tiel proksime al ĝiaj obskure grizaj tempaĵoj kaj al ĝiaj hele bluetaj trankvilaj horoj . . . Mi memoras la mistikajn ekstazojn apud ĝia senhoma bordo — — — Ĉiu memoro estas mirinda bildo en lume griza kaj profunde viola koloro, ĉiu memoro belodoras kaj ebriigas. Mi memoras unu papavokampon meze de flaviĝantaj grenoj — kaj tio estis tiel neesprimeble bela! Mi memoras ankaŭ unu verdan kampeton en la arbaro — bukloherban kampeton surŝutitan per milionoj da miozotoj, violoj kaj kampanoloj . . . Kaj ĝi estis belega! . . . Sed ĉiam la severa rigardo de la miloj da obskure verdaj okuloj de la tempestoza maro regas mian animon — kaj la profundo de mia animo apartenas al la maro. Kaj ĉiam ĝia hela rigardo — en minutoj de

kvieta sopiro — rigardo de senkulpa knabino el la kara malproksima Nordo, ĉiam tiu ĉi hela rigardo konfuzas miajn sentojn kaj vokas — vokas mian animon al la ĝojo de unu dulce far niente ĉe la bordoj de l'forĝeso. Maro, kara mia maro — estu benita vi kun la belo de viaj tempestoj kaj de viaj kvietaj horoj! Maro — maro . . .

Nun estas nokto. Tria nokto. La laco venigis al mi strangan memoron. la lumeto baraktas en la profundoj kaj volas eliri. Kio ĝi estas, kio ĝi estis?

Vi estas eble iu neantaŭlonge naskita revo? Aŭ eble — memoro pri iu forgesita pasinteco? Ah, jes — rememoro pri forgesita ĝojo vi estas. Mi konas viajn okulojn. Kiel ili min rigardas dum miaj ekstazoj de superkonscio . . . Kiel elvokas tra la nebulo de la malproksimo tiujn estintajn ĝojojn, pri kiuj la memorkapablo silentas . . .

Eble vi estas viro. Eble nur ekluminta sub la suno naturo, eble nur sunradio. Sed vi estas por mi: milda rigardo, kareso, kvieta kiso, vi estas la sola amo por mi.

Ĉio bela ĉe mi, en vivo mia, estas al vi dediĉita. Kaj kiam la malbela regas mian saĝon kaj mian animon — deturnu la okulojn, deturnu la klarajn okulojn! — ĉar tiel mi hontas pro mia kulpo, ĉar tiel min konfuzas la fratina ilia amo!

La papavo-kampeto, kaj la flora tapiŝo en la arbaro, kaj la ŝanĝiganta maro — ĉio estas kareso de via rigardo, ĉio estas — milda esprimo de via granda amo. Kiel nur ĝi min ebriiĝas. Kiel nur ĝi estas ankaŭ mia amo al vi, nekonata, al via kvieta klara rigardo, al viaj kvietaj molaj karesoj . . .

Nun estas nokto. Mi sonĝos la feliĉon. Kaj eble endorme flustros vian nekonatan nomon, mia amo, la lipoj de via

Miti

Cigana muziko

„Mi ankoraŭ bone rememoras pri la neforpuŝebla ĉarmo, kiun li ekzercis, kiam distrite kaj samtempe kun melankolia malatento, akre kontrastanta je la ŝajna gajeco de lia temperamento kaj je la vigla rigardo, kiun li kvazaŭ sondante ĵetis en la animon de la aŭskultanto, li prenis en la manon sian violonon kaj dum longaj horoj, kvazaŭ li estus forgesinta, ke la tempo forflugas, eligis el ĝi tontorentojn, kiuj jen furiozis en sovaĝa falo, jen fluis kiel super velure mola musko.

„La sekretaj eliksiroj, kiujn la mezcentjaraj alkemiistoj kuiris en siaj mallumaj laborejoj kaj kies kuracanta fluidaĵo devis envenŝi novan vivforton en la homajn vejnojn kaj doni forton, virecon, kuraĝon, fieron, nevundeblecon, neputreblecon, eble vekis ĉe la trinkintoj similan senton, kian produktis tiu ludado de la granda ciganvirtuozo.

„Kiel gutoj de fajrepikanta esenco la tonoj de la ĉarmanta violono frapis la orelon“.

Tiel skribas la plej granda el ĉiuj virtuozoj, Franco Liszt, pri la „plej konita, plej ŝatita kaj plej populara“ heroo de la cigana muziko, Johano Bihari, kiu altigis ĝian famon je la plej alta supro kaj kiun li mem aŭdis jam en la jaro 1822. Ankaŭ alia samlandano kompletigas la impreson skribante, ke la ludado de Bihari estis plena je malkvietego; kelkajn melodiojn li ludis tute simple, sed kun esprimo, kiu kaptis ĉies koron.

Kio estas la kauzo de tiu nekontraŭstarebla entuziasmiga efiko kaj kio la originaleco de la cigana muziko kompare al la nordeŭropa arto?

Antaŭ ĉio oni devas rimarkigi, ke la ludado de tiuj virtuozoj ĉefe estas improvizo, t. e. libera fantaziado je ekzistantaj popolaj kantoj kaj nur tre malofte je memtrovitaj melodioj. Animo tie-ĉi parolas al animo, sento al sento, kaj nenia tradicia formo malhelpas la libere ondfluantan sentadon. Kaj tio okazas ĉe tiaj verai naturinfanoj, kiuj en la mondo nenion posedas, nenion amas pli ol sian sanktan patrinon, la naturon. Laŭ la ĝenerala opinio tiuj ciganoj estas gento devenanta el la lulilo de l'homaro, la malproksima Hindujo. Alia gento rabis ilian posedaĵon, ilian ŝtatan vivon kaj fine eĉ ilian kredon pri si mem, pri Dio. Tiel ili nun migradas, dum jarcentoj, eble dum jarmiloj, havas nenan ŝtaton, neniajn leĝojn, nenan kulturon, eĉ, kiom ni scias, nenan religion. Sed ilia patrujo estas la tuta mondo kaj ĉie, kie la cigano sin trovas, li sentas sin hejme. Ĉar la naturo ĉie estas la eterna, potenca, nobla, neelĉerpebla donacanta patrino; povas esti vintro aŭ somero, sudo aŭ nordo, nur la ekstrema mizero alportas tiun filon de la dezetro sub tegmenton. Nur sub la libera ĉielo li bone fartas kaj suĉas rekte el la ĉarmo de la eterne juna patrino naturo, la vivgardantan kaj vivigantan eliksiron, tiun fajran fluidaĵon, kiu dum lia ludado kiel malpermesita frukto turniĝas en nia sango. Tio povis havigi al ni ideon, kiel la muziko devas esti efikinta dum la bakhaj dancoj okaze de la festoj de Dioniso. Ĉar tiuj ĉi dancoj devenis ja el la malgrandaziaj landoj, kiuj siavice interrilatis kun tiuj plej antikvaj popoloj, kies tuta kulto estis nur profunde sentata naturmistiko kaj kiuj sekve sciis per sorĉa arto kaj antaŭ ĉio per la muziko liveri la ĉarmon, kiun la naturo povas ekzerci sur niajn sentojn.

Georgo Aktarĝiev

Ne volante esti profeto, mi estas konvinkita, ke Esperanto efektive ludos tiun grandan rolon, kiu inspiris ĝian genian aŭtoron — Dron Zamenhof —: fariĝi potenca ilo de la proksimiĝo kaj de la interkompreno de plej malproksimaj popoloj. Ĝia lerno en la lernejoj havas ankaŭ nediskuteblan pedagogian utilon: ĝi laŭ maniero plej facila malkovras antaŭ la intelekto de l'infano la internan logikan konstruon de unu lingvo.

Prof. D-ro Jozefo Fadenhecht

Triobla fragmento

1. SEP KNABINAJ NOKTOJ

Al Mika

Orbukla knabino dronis inter floroj de printempa parko kaj ludis kun ĉirkaŭe flugantaj papilioj. Laŭ ŝia vidpunkto, la floroj estis bonfarantaj parfumigitaj feinoj, kaj la papilietoj — iliaj pedeloj, per kiuj la bonulinoj ekzercadas sian bonecon.

Maljunulino, malrapidege marŝanta, venis kaj eksidis sur ŝtonon apud la knabino, demandante ŝin: — Kiu vi estas, karulineto?

La knabino afable ekridetis kaj, kisinte entuziasme ambaŭ manojn de l'maljunulino, respondis:

— Mi estas produkto de sep noktoj. Dum la unua — pro pasia amo de miaj gepatroj, mi ekkreiĝis en la utero de mia bona patrino. Dum la dua — por feliĉega ĝojo de miaj amantaj gepatroj, mi aperis en la mondo. Dum la tria — kiel junega infaneto, post danĝera malsanado, mi malfermis okulojn kaj vidis, ke mia patrino flegis min en maldormo ĉe mia lito kaj ploris, zorgante pri mi tutajn noktojn kaj tagojn. Dum la kvara — mi vidis mian patron ploranta pri sia ĵus enterigita mortinta patrino, mia neforgesebla avino. Dum la kvina — mi ĝojis pro naskiĝo de mia frateto. Dum la sesa — mi komprenis kio estas kontenteco post bonfara ago al proksimuloj. Dum la sepa — mi pasie ekamis la sciencan kaj fariĝis prudenta scivolema homo, kiu deziras sin perfektigadi. Jen do kio kaj kiu mi estas nun, avineto afabla. Kaj ŝajnas al mi, ke mi ja vivas en mondo de Belego. Min ja ĉirkaŭas nun grandega amo de patrino, de patro, de geonkloj, de gekuzoj, de gekamaradoj kaj de geïnstruistoj. Kaj mi ĉion komprenas, ĉion utiligas kaj ĉion estimas, kiel edukilon por mia karaktero. Multaj feinoj liveras al mi feliĉojn. Jes, mia avineto! Mi klopodas koni ĉion bonan. Ĝoje mi laboras kaj plezure mi ripozas. Mi ja estas produkto de tiuj sep noktoj.

La knabino kaj la maljunulino longe — longatempe koversaciis tie — inter la floroj kaj la papilietoj.

2. SEP FRAŬIJNAJ NOKTOJ

Al Vera

Bukloharara simpatia fraŭlino flugis sur blanka birdego tra la tuta mondo — super riĉaj valoj kun grandaj urboj, super majestaj montoj kun belaj vilaĝoj kaj super paradizaj ĝardenoj de nereaj revoj. Lace ambaŭ vojaĝantoj — la fraŭlino kaj la blanka birdego — defalis en princan palacon. Venis princo kaj demandis la fraŭlinon: — Kiu vi estas, belulino?

Ŝi ĝoje respondis: — Mi estas produkto de sep noktoj. Dum la unua — mi maldormis pro ĝojo okaze de unua sukcesa lernantina ekzameno. Dum la dua — mi kontentis pro amikina feliĉo.

Dum la tria — mi festis mian unuan enamiĝon kaj priverkis mian unuan amleteron. Dum la kvara — mi priploris mian perfidintan unuan kaj lastan amaton. Dum la kvina — mi pripensis mian socian situacion kaj decidis servi al la homaro por forgesi miajn proprajn malgajojn. Dum la sesa — mi perdis amikindon kaj akiris amikon, per kiu mi reekamis la vivon. Dum la sepa — mi ekdeziris edziniĝi kun mia amiko kaj eksidis sur la dorso de tiu ĉi blanka birdo, per kiu nun mi flugas tra la mondo, serĉante potencon de feliĉa virino, kiu ĉiam kontentu pri sia propra situacio. Kaj ĉion ĉi mi komprenas, utiligas kaj estimas, kiel riĉigilon por mia koro. La mondo aspektas, laŭ mia konkludo, kiel netera paradizo kaj min logas la regno de l'revoj. Muziko, poezio kaj beateco min ĉirkaŭas. Jes, Sinjor' Princo! Mi estas produkto de tiuj sep noktoj.

Fininte sian parolon, ŝi frapetis la flugilojn de sia blanka birdo kaj ĝi tuj priplaudis ilin kaj forflugis kune kun la revema fraŭlino.

3. SEP VIRINAJ NOKTOJ

AL LUIZA

Ne tre juna virino, kies hararo jam estis griza, sidis profunde enpensiĝinta apud sia labortablo kaj rigardis eksteren, tra la fenestro. Petolema pasero alflugis sur apudan boskon kaj, post observo al virino, ĝi elpepis: — Kiu vi estas, noblulino?

La griza virino jetis rigardon al la pasereto kaj enpensiĝinte respondis:

— Mi estas produkto de sep noktoj. Kiam la suno sin kaŝas por ripozi, alvenas la tempo de meditado. Liberigite de l'tagaj bruo kaj zorgo, la homo restas kun sendependaj pensoj kaj sentoj de la subkonscio. Kaj okazas tiam prikalkulo bilanca. Kaj jen — ankaŭ mi mem jam trapasis tiajn noktojn sep, por fine esti ties produkto. Dum la unua — mi naskis mian unuan infanon kaj klare eksentis, ke dolĉa, sed peza ŝarĝo sin metis sur miajn ŝultrojn. Mi ĵuris, ĝin porti brave kaj konscie. Dum la dua mi rimarkis, ke ne sufiĉe sperte mi plenumas miajn taskojn de edzino. Dum la tria — mi perdis filon, kiel viktimon de mia propra malsperta severeco, kaj komprenis, ke mi ne plenumas trafe ankaŭ miajn taskojn de patrino. Dum la kvara — mi decidis esti ne severa, sed milda kaj tenera koncerne miajn infanojn, por ilin eduki laŭdece, ilin al mi ligi fortike kaj ilin ne puŝi al abismoj. Dum la kvina — mi konkludis, ke post la zorgoj pri karaktero kaj post la postuloj de la koro, mi devas zorgi ankaŭ pri animo kaj plenumi ankaŭ postulojn de animo; ke la karakterkorekteco kaj la bonkoreco min helpas ja rilate miajn edzinecon kaj patrinecon, sed al mi mankas la grandanimeco de virino — ke ankaŭ virino mi devas esti, virino — homo kun sociema karaktero, kun homama koro kaj kun altspirita animo. Dum la sesa — mi kontentis pro konstato de anima kaj intelekta harmonio inter mi kaj mia edzo kaj de absoluta amikeco inter mi kaj miaj gefiloj. Tiam mi ekamis la vivon unuan fojon plen-

konscie kaj helcele. Dum la sepa — mi konstatis, mia pasereto, ke ne nur korekta edzino kaj ne nur sperta patrino, sed ankaŭ klera virino mi estas, virino — homo, kiu posedas kaj konas la animon de l'homo kaj scipovas plori pro fremdaj suferoj, ilin povante forigadi, — ridi pro fremdaj ĝojoj, ilin sciante daŭrigadi, kaj — mediti pri grandaj tutmondaj problemoj en ili partoprenante meminiciate. — Jen do kio kaj kiu mi estas. Nun mi sidas kaj ne ploras pri mia mortinta filo, ne kontentas pri harmonia amo de mia edzo kaj ne ĝojas pro senmakula konfido al mi de miaj gefiloj, — sed sentas mian animon de virino. Mi ploras, kiam ploras la edzo kaj la gefiloj, ĉar ili ankaŭ posedas karakteron, koron kaj animon de homaranoj; mi kontentas, kiam mi konstatas harmonian amon inter ceteraj geedzoj; mi ĝojas, kiam observas senmakulan konfidon inter ĉiuj gepatroj kaj gefiloj. La animo estas la unika elemento de la homindeco — ĝiaj alineoj estas la koro kaj la racio, sed ĝia absoluteco — la Amo de l'Krucumito. Forflugu, gajema pasereto, kaj anoncu, ĉion ĉi al la tutmondo. Mi ja estas do — produkto de sep memorendaj noktoj.

La pasereto reelĉirpis kaj forflugis, por disporti la anoncon pri la Amo de Krucumatoj tra la tuta terglobo. Stela Morbilli

Skizoj

1.

Mediteme mi paŝas tra la stratoj. Malvarme. Plumbaj nuboj sufoke pendas kaj malgajigas la veteron. La urbo — kvazaŭ morta. Ekgutas. La homfiguroj plirapidigas siajn paŝojn. Baldaŭ la stratoj senhomiĝas. Ekregas silento. Interplaneda, enuiga silento.

Malvarme. Enue. Malgaje. Dum tia vetero plej konvene estas plori. Nur plori!

Eh, kial mi ne povas plori!

2.

Mi marŝas en la randurbaj kvartaloj. Kotozaj strataĉoj. Domaĉoj. Ĉio malplaĉa. Ah! Aĉe!

La tuta kvartalo - marĉo. Mi haltas kaj rigardas. Antaŭ unu pordo — mortigita hundo. Malbonodoro. La dentoj de ia eluzita ŝuo rikanas al mi. Ĉifonoj, pajlo kaj kokplumoj. Mi staras senmove. Subite malfermiĝas fenestro, kies duono estas gluita per gazeto. Aperas virino. Ŝia maldekstra mammo, nigra kaj malgrasa pendas ekstere. En ŝiaj manoj kriegas skeleto.

— Kion vi volas, sinjoro?

Mi ne respondas. Ja, mi mem ne scias. Mi deziras demandi, kiu estas la estro de tiu kvartalo, sed jam la fenestro estas fermita.

Strange. La mortigita hundo komprenas mian penson kaj respondas: „Kvartalestro? Ha, ha. Ĉu vi ne scias? Lia Moŝto. Sinjoro Malriĉeco!

Mi konsterniĝas. En mia koro naskiĝas indigno. Mi singultas kaj ĝi venas en mian buŝon. Mi maĉas, maĉas ĝin kaj... ekkraĉas.

Ve, neniu min aŭdis!

Zahari Zahariev

La iracionalismo en la bulgara popolkanto

La nedivenita kaj la nekonata en la ligoj inter la emocioj internaj kaj la naturfenomenoj, la origina perceptemo pri proporcio kaj kontrasto, jam malklaraj, forviŝitaj kaj de ni mem nekonciataj, pro malproksimeco, — jen estas la embrio de la poezieco en ĉiu primitiva kreado. Al ĝi oni ne povas veni per la rimedoj de la scienco, nek per la zorga ekzamenado de la scienculo — laŭ sia propra aŭ laŭ alies komisio. La scienco povas esti fiksinta la enhavon, la motivojn, la stilon, la artefektojn, la kosmogoni-elementojn, la komparan mitologion ktp., sed ĝi ne estos atinginta la esencon. La iracionalismo ripetita kaj elmontrita rezultigus ree racionalismon. La jeno estas bezona. Oni devas havi la talenton de interpretisto, laŭspirite proksima al la popolo, kiu devas doni de si mem por preni; rafini la malnovon per sia nova psikstato, por ke riĉiĝu la rekreaĵo. Kaj ĝi ne povus okazi sen amo kaj sen sincereco de la travivado kaj sen kreimago, sen reveno al la praritmio, al la kaoso de la animo popola kaj de tie denove al la kreado. Nur tiam. Kaj necesas longa vivado meze de la popolo unuflanke, kaj aliflanke — vasta skalo de persona sentimento. Kaj tiel riĉa kaj vasta estas la bulgara popolkreado kaj tiel nekulturita tiurilate ĝi estas, ke mi povis nur kelkajn trunketojn elpreni, kiom povis atingi miaj manoj, kreskintaj kaj laborintaj meze de la popolo.

Tra la simbola simpleco de nia efektivo oni devas ekiri.

Montaranoj ni estas. La montaro estas la plej potenca bildo, kiu plej forte influis sur nian primitivan animon. Ĝi estas la sino de la akvoj. La rivero estas la dua bildo, el ĝi trinkis niaj plej ĉarmaj kantoj. Unu el ili estas:

1. ELFO PEREIGAS STOJANON

En tiu eta popola balado el deko da linioj, en ĝiaj iracionalismaj tonoj konturiĝas originala tragedio de l'animo.

La trapasejo de l'rivero naskigas — por unua fojo — la ne jam konitan por la pura kaj juna ankoraŭ montarano amsenton, en ĝia plej subtila nuanco — raviĝo kaj sopiro. Malfrue li al la rivero iras kaj haltigas la bubalojn por ilin trinkigi ĉe la rivertrapasejo. Luno lumas. Ĉi tie, kie la frustrado de la rivero estas plej mallaŭta, tiu flustro murmuris longe kaj enverŝiĝas en la koron junulan. Li rigardas, kaj la akvaro etendiĝas kvazaŭ silka sino kaj en la trankvila surfaco vibras la steloj. Li vidas la ŝtonon jetitan trans la bordo, kie la akvo murmuris; brilas la luno, genuo silka. Kaj lia pliaĝa fratino ja admonis lin, ke li ne sidu malfrue ĉe la trapasejo, ĉar tie „Elfo en sian baskon stelojn kolektas“, ŝi povus lin pereigi. Sed li ne povas retiriĝi. Jen — li jam aŭdas: voĉo mallaŭta de estaĵo vivanta murmuris. Lia koro sin donas. Li ne vidas vizaĝon, sed la potenco de la raviĝo pre-

nas for liajn forton kaj volon. Ĉi estas „Elfo — ravantino“, ŝi al li parolas. Estas finite. Nur magio povus lin kuraci. Tian parolon li ne plu aŭdos de virino kaj lia koro fermiĝos por ĝojoj... Li revenas, Kuracherboj ne helpas. Sola nur — la morto. Li mortas.

Pro la tiel forte manifestitaj unua amo kaj sopiro, vekitaj tiel subite kaj potence antaŭ ol ili trovis certan objekton, ne sciante la elirpunkton, tiuj primitiva forto kaj erupto estas nur mortigaĵ. Jen unu el la puranimaj, tutecaj naturoj de montulo — li mortas kiel ano de la gento de Asra. La beleco, vane ensorbata, nedividita kun varma homa koro — veneno estas. Estas bezona — ja tion la popolo divenas — nur veneno de herbo, por ebriigi la angoron pro la nekonata, kiu embrias. La nepostvivita, nekonita amsopiro kreis la bildon de Elfo mortigas Stojanon (Бродница погубва Стояна).

Elemento en elemento: akvo — inklino — sopiro — elfo — morto. La unuan erupton kaj soifegon de nerompita tuteca naturo nur la morto — la rivero plej trankvila de la vivo — trinkigos kaj kvietigos.

2. TUNĜA *) — INKLINO — SOPIREGO

Tutajn familiojn formas la riveroj, — nian unuan mitologion. Tunĝa, la plej malgranda fratino de la blanka Arda kaj de la trankvila Marica, la kontrakton faritan inter ili: dormi kaj ripozi, kaj matene atendi unu la alian por kune survojiĝi al la blanka Maro — la Blanka Princo, — tiun kontrakton Tunĝa rompas. Ŝi frue ekiras, ne avertinte, kun la fluegado de printempaj torento-akvoj. Flamiĝemo junulina, haltigebla per nenio. Ŝi iras, bruegas, centjarajn trunkegojn fortrenas. Ŝi rompas tradiciojn kaj malhelpaĵojn sur la vojo de sia fluo. La neprudenta virgino de niaj arbaroj estas la malgranda, malkvieta montarino. Ŝi ĉiujn kondiĉaĵojn venkas. Tiu detruanta impulso tamen helpas ŝiajn fratinojn — Arda kaj Marica — por ke ili ne jam foruzinte siajn fortojn sur la vojo, kiun ŝi traboris, post ŝi senpene kaj trankvile povu ekiri kaj eĉ ŝin mem antaŭiri survoje al la Maro.

3. MONTO — ŜIRMANTO

La monto havas specialan bildon por la animo de la virino bulgara de la tempo de nia sklaveco (de antaŭ 50 jaroj). La viro konsideris la spiriton de la Montaro kiel apoganton en sia lukto por libereco kaj libera vivo. Nia virino konceptas Star-Planina (la Balkan-montaron) kiel ŝirmanton de la gento, eĉ ankaŭ kiel ties kreinton. Tiel, bulgarino ne havis dum naŭ jaroj propran idon; dum naŭ printempoj herbkuracistinoj al ĉi herbaĵojn de la monto alportas, kaj ŝi ekgravedas je kara ido. Sed tempoj malfacilaj, zorgoplenaj. Turkoj ŝin kaptitan forkondukas; ili igas ŝin idon ĵeti for sur la vojon. Ŝi deiras en la arbaron, maljunan

*) Tunĝa kaj Arda, sudbulgaraj riveroj, kunfluantaj en la plej grandan Marica kaj ĉiuj tri kune — en la Egean (Blankan) maron.

abiarbaron. El lianoj lulilon pretigis Stara-Planina — inter du abioj graciozaj. Si sian idon luligas kun kanto dormiga por la lasta fojo. La montaro ŝin konsolas: „Ne plu zorgu pri l'infano, mi por li patrino estos, du abioj — fratinetoj, kaj la vento lin luligos, kaj ja banos lin la roso, la cervino lin mamnutros Iru, iru nur...“ Monto, ho maljuna patrineto, pardonu! Konsolo venas kaj eĥo de la arbaro — „Iru, iru for kun Dio!“

4. FALKOJ — FRATOJ

Du ĝemeloj disiĝas, sed iliaj falkoj ne povas disiĝi. Ili flugas super iliaj domoj kiel hejma nedisigebla forto, kiel riproĉo de ilia saĝo, — cerbumanta, praktikema leĝo pri divido. Stojan lasas aglidon venki la senpovan falkon. Simbolo de lia forto kontraŭ sendefenda animo — lia frato. La ĉi-supra paralelo malkovras profundecon en la koncepto de la rilatoj inter fratoj, kiaj ili devus esti. Ĝi malkovras ilian naturon mem.

Slavka Ŝtiplieva

Inter ni

Homoj ni estas — ni ne povas eviti erarojn. Sed ĝuste ja pro tio estas bezone, ke ĉiam eraro estu montrata, por esti forigata kaj ne plu farata.

Eraro, kiu ofte povos efiki tre malbone sur nian propagandon, estas la fakto, ke ni ankoraŭ en multaj okazoj akceptas senkritike nesufiĉe precizajn sciigojn pri sukcesoj de Esperanto en tiu aŭ en alia lando, kaj ke estas kelkaj inter ni, kiuj rapidas disfamigi tiujn nerevizitajn faktojn en nova redakto, ankoraŭ unufoje modifita favore al Esperanto. — Eble, en la okuloj de iuj esperantistoj, tia agado signifas „propagandistan spertecon kaj lertecon“. Tamen, ne estas tiu vojo inda por propagando de afero, kia estas la esperanta, kaj ne tiamaniere oni povus altiri la atenton kaj gajni la opinion de seriozaj rondoj. Plej ofte simila propagando per trograndigitaj faktoj rekte malutilas. Pro la senpripensa bruo de trofervoraj propagandistoj ofte serioza propagandisto estas metata en tre maloportuna situacio: li devas respondi pri la stultaĵoj de la trofervoruloj.

Ekzemple, antaŭ unu jaro en unu bulgara ĵurnalo aperis noto pri la Esperanto-movado en iuj landoj, en kiu noto la aŭtoro (esperantisto) skribas, ke „en Francio, depost la ministriĝo de la konata malnova kaj tre energia gvidanto de la esperantista movado Heriot... ktp“.

Kiel renkontus tian senskrupulan trograndigon serioza kaj konscienca esperantisto? Li vidas sin devigata unue refuti antaŭ la publiko tiun malveraĵon kaj iamaniere komprenigi, ke tio pezas nur en la konto de la aŭtoro, ne de la esperantismo.

Vere, en kelkaj okazoj ni devas savi esperanton de ĝiaj trofervoraj amikoj mem!

Pro tio estas pli ol necese, ke ni tre atente renkontu la diversajn sciigojn, ke la nesufiĉe klarajn ni ne alplenigu arbitre, ke ni ne mezuru ilin per la mezurilo de nia enlanda efektiveco. Ni devas kritike akcepti tiujn faktojn, esplori ilian esencon, kompreni ilian signifon, kaj nur tiam uzi ilin en la propagando — en ilia ĝusta, esenca formo.

Unu eraro de tiu speco, ŝuldata al miskompreno, sed bedaŭrinde nekorektita ĝustatempe, estas la publikigo de opinio pri Esperanto, atribuata al la rusa poeto K. Balmont. — Ĉiu, kiu konas almenaŭ iom la naturon de lia verkado kaj lian stilon, tuj povus kompreni klare, ke la citata propaganda prozo pri la signifo de Esperanto por la lernantoj, verkita en teda, rezona, kancelaria stilo, neniel povus eliri elsub la plumo de tiu granda poeto.

La opinio, efektive, estas de alia poeto, multe malpli granda, sed, portanta tre proksiman nomon: la pola poeto kaj ĵurnalisto Leo Belmont, esperantisto. Unu el liaj verkoj aperis iam en bulgara traduko („Животътъ е сънь“ en la gazeto „Библиотека“, eldonata de Pavel Genadiev). Li estas unu el la plej malnovaj esperantistoj en la mondo kaj unu el la unuaj, kiuj sonigis la esperantan liron.

La priparolata propaganda teksto apartenas al lia plumo — kaj ĝuste al ĝi ja povus aparteni.

Sed, ĉar lia nomo ne estis sufiĉe konata, la unua esperantisto ĉe ni, kiu trovis lian opinion kaj deziris utiligi ĝin, konfuzis lian nomon Belmont kun la nomo de la granda rusa poeto Balmont, kaj de tiam daŭras ĝis nun tiu ĉi miskompreno, pri kiu ni devus certe bedaŭri, ĉar tute ne povos esti en utilo de Esperanto simila eraro.

Montrante ĝin nun, mi dezirus, ke la eraro estu jam korektita kaj ne plu allasata, kaj mi ankoraŭfoje ripetas la konsilon: explore kaj analize operaciu kun la faktoj, kiujn vi uzos ĉe via propagando. Nur en la vero povos esti la forto.

Ada

Hodiaŭ estas superflue defendi Esperanton: la fakto, ke ĝi ekzistas kaj estas uzata, jam sufiĉe pravigas ĝian rajton de ekzisto.

Esperanto estas nun efektivaĵo, kaj ne propono. Al kiu ĝi ne plaĉas — li ne ĝin akceptos, malgraŭ tio tamen en la mondo estas lingvo — facila kaj por ĉiuj akirebla — uzata de ĉiam pli kaj pli da homoj en ĉiuj landoj.

Por la esperantistoj esperanto jam sukcesis, ĉar ĝi servas al ili. Ili kreis per ĝi inter si vivon, de kiu ili ne plu sin deŝiros.

Esperanto estas kreita por servi ĉie, kie ekzistas rilatoj internaciaj, ne tuŝante tamen la regionojn de la lingvoj naciaj, ne intencante fariĝi ununura lingvo. Kaj la regiono de la vivo internacia estas tre vasta kaj la internacia lingvo ĉiun tagon eniĝas en ĉiuj ĝiaj branĉoj kaj fortike enradikiĝas.

Atanas D. Atanasov

Enlanda Esperanto-movado

Sekve de la akcepto de Esperanto kiel klara lingvo flanke de la internacia Telegrafa Konferenco, la Ministro de la Fervojo, Poŝto kaj Telegrafio en Bulgario eldonis ordonon N-o 83076 de 19. III j. k., kiu vortas:

Mi ordonas ke estu cirkulerite al la stacioj en la reĝlando, ke oni akceptu kaj interŝanĝu senbare telegramojn por la lando, skribitajn en la lingvo Esperanta, kaj samtempe oni sciigu pri tio al la publiko.

Jen ankaŭ ĉi-sube la teksto de la tuj poste sekvinta cirkulero de la Ĝenerala Direkcio de P. T. T.

Al la S-roj estroj de Telegrafo-postaj stacioj en la reĝlando.

Estas sciigite al vi por informo kaj por plenumo, ke, ekde la 1-a de la venonta monato Majo, estas permesata la akceptado kaj interŝanĝo de privataj telegramoj por la interno de la lando, skribitaj en la artefarita helplingvo Esperanto.

Sekve de tio, al vi estas disponigataj la ĉi-sekvantaj mallongaj informoj pri la reguloj gramatikaj kaj ecoj de Esperanto. Ĉi tiu eltiraĵo, kiu esence estas la tuta gramatiko de la lingvo, estas precipe necesa por via personaro, senpere partoprenanta en la interŝanĝo de la telegrafa korespondo.

Anoncu tiun aferon al la publiko kaj invitu la estratan de vi personaron konscii la gravecon kaj la signifon de tiu estonta internacia lingvo kaj komenci lerni ĝin, des pli, ĉar ekde la 1. de Novembro j. k. ĝi estos permesata de ĉiuj ŝtatoj de la Telegrafa Unio por internacia trafiko.

Ĝenerala Direktoro (subs.) St. Ivanov.

Fakestro (subs.) C. Hristov.

Haskovo. Fondita nova junula grupo — 20 p.

Belogradĉik. Fondita nova gelernanta grupo — 20 p.

Sliven. 2 kursoj.

Sviŝtov. Kurso ĉe la Komerca gimnazio — 30 p. La grupo estas renovigita.

Gabrovo. Kurso ĉe la mekano-tekn. lernejo.

Gorna Ĝumaja. Kurso — 30 p.

Svilengrad. Kurso.

Jambol. Kurso por lernantoj — 60 p. Aliaj 4 kursoj por urbanoj.

v. Kramolin (Sevlievo). Fondita nova grupo — 31 p.

v. Provalenica (Radomir). Kurso — 16 p.

Stara Zagora. Kurso por oficistoj — 25 p. Fondita nova lernanta grupo.

v. Brest (Nikopol). Kurso.

Redakcia komitato:

Asen Grigorov — Zahari Zahariev

Anoncoj estas pagataj po 2 levoj por kvadrata centimetro.

Diversaj

— S-ro Z. Zahariev verkis Esperantan Sintakson por bulgaroj, kiu estas eldonota de Bulg. Esp. Societo. La sintakso kostos 20 levojn; se tamen oni antaŭpagis ĝis la 15. Majo j. k. ĝi kostos nur 15 levojn.

Ĉion sendu al la adreso de la administrejo.

— La Bulgara Esp.-Societo eldonis belan esperantan murkalendaron kiu enhavas interalie la opiniojn de famaj verkistoj kaj scienculoj kiel Romain Rolland, Max Müller, Leibnitz, Henri Barbusse, Prof. Charles Carolea, Prof. Wilh. Ostwald, Montesquieu, Maxim Gorki Tristan Bernard, Leo Tolstoj kaj de la bulgaraj universitat-profesoroj Ivan Ŝiŝmanov, Benju Conev, M. Arnaudov, J. Fadenhecht. La valorajn opiniojn de la ĉi lastaj oni legu en la nuna kaj en la februara numeroj de la revuo. La kalendaro estas havebla kontraŭ 5 levoj bulgaraj, adr. de la administrejo.

Marin Tabakov, Teteven, deziras korespondi esperante kun gefraŭloj.
